# *ESPERANTA MARSELIEZO*

1

*Ni komencis tutmondan ribelon*
*Kontraŭ premo de la kapital',*
*Sur la flago ni havas la stelon*
*Kaj la sanktan devizon « batal ! »*

2

*Kontraŭ burĝoj, vampiroj sovaĝaj,*
*Kiuj suĉis la sangon de l'mond',*
*Ĉiuj niaj amikoj kuraĝaj*
*Unuigas fortike en rond',*

3

*Nun ĉiu kun forta, honesta anim'*
*La manojn al ni jam etendas !*
*Nin venko triumfa atendas, —*
*Antaŭen do, fratoj, antaŭen sen tim' !*

4

*De l'patrinoj mizeraj sopiroj,*
*De l'orfuloj kriado kaj plor',*
*La ĝemad' de l'sennombraj martiroj*
*Unuiĝis minace en ĥor'.*

5

*Kaj senvartoj de l'oro idolo,*
*En palacoj kaŝantaj sin nun',*
*Ne forkuros de venĝ' de l'popolo,*
*De severa, kruela mortpun' !*

6

*Tiel same, kiel N° 3.*

7

*Sed milito ne estos konstanta, —*
*Ĉin altigos de l'paco signal',*
*Kaj de tiam la mond' esperanta*
*Tuj revenos al paca batal'.*

8

*Do dum nuna kruela batalo,*
*Esperanton konservu memor',*
*Ĉar sen ĝi Internacionalo*
*Estas korpo potenca sen kor' !*

9

*Tiel same, kiel N° 3.*

10

*Unuiĝos nur por Esperanto*
*La tutmonda proletariar',*
*Kaj de tiam jam tiu ĉi kanto*
*Estos kanto de l'tuta homar'.*


11

*Kiam reĝos la pac' sur la tero*
*Kaj trankvile brilados la stel',*
*La milit' kontraŭ homa malklero*
*La plej sankta per ni estos cel' !*

12

*Tiel same, kiel N° 3.*

Petrograd (Rusujo) 1921. V. N. DEVJATNIN.



# Mortigo de Francisko Ferrer

**(13-an de Oktobro 1909)**

*Ĉar la sanktaj libroj skribas*
*Scienculojn di' malamas,*
*Pripensadis nigra bando*
*En Rom-urbo ĉe la papo,*
*Kiel foje, tiel ree*
*Pereigi, senkapigi,*
*Homon, ilin kontraŭontan,*
*Kiun estos ekkaptonta.*

*Sed la povon plu ne havas,*
*Kiel tiam, kiam povis*
*Bruli vivan Brunĝordanon,*
*Ekmortigi Galileon*
*Kaj aliajn saĝajn kapojn.*
*La senkulpajn suferantojn*
*Turmentegis, bruliĝadis*
*Aŭ alie mortigadis.*

*Ĉar sur temp' antikva tiu*
*Ĉie nur mallum' pezegis,*
*La popolo blind', senkulpa,*
*Premegita kaj dolora,*
*Ĉar senscia, senkonscia,*
*Ĉie serĉis sian savon,*
*Fidis al la nigra bando,*
*Kiu skuis en la lando.*

*Tim', teruro, reĝis tiam,*
*Doloregojn suferadis,*
*Kiu sin ne eksubigis*
*Al la band' de l' mortigantoj.*
*Sur popolo pezis dormo,*
*Al idoloj sin klinigis :*
*Al la kruco, bild', preĝejo,*
*Pastro, reĝo, mallumejo.*

*Tiel superstiĉ' malsaĝa*
*Sub preĝejo kaj sub trono*
*Subigadis kaj blindigis*
*La popolon, tage, nokte.*